

La kasedo Al Venko de József Dinnyés, kanzonoj de Julio Baghy

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 februaro

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-09/SRI-1988-09-A-3-Claude-kaj-Andree-Gacond-La-kasedo-Al-Venko-de-Jozsef-Dinnyes-kanzonoj-de-Julio-Baghy.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond daŭrigas sian konversacion kun la skribemaj geaŭdantoj. Per la alfabeto ordo de la landoj ni alvenis al Hungario, kie ni restos hodiaŭ.

A.- El Hungario venis la kasedo 'Al venko' de József Dinnyés. La pasintan semajnon ni finis nian salutadon aŭdigante ĝian unuan kanzonon, 'Ĉiam denove'. Hodiaŭ ni restu en Hungario aŭskultante la interpreton fare de József Dinnyés de tri kanzonoj de Julio Baghy. Jen lia siberia lulkanto :

(muziko)

Cl.- Estas fakte emociige reaŭdi kanzonojn de Julio Baghy. Aŭdu nun lian 'Al venko' ĉiam pere de interpreto de Jozef Dinnyés, pere de la nova kasedo 'Al venko' el Hungario.

(muziko)

Cl.- Tiu ĵus aŭdigita kanzono de Julio Baghy donis la nomon 'Al venko' al la kasedo de József Dinnyés. Fakte, József Dinnyés interpretas trian kanzonon de Julio Baghy : '[La polvohomo meditas](#)'. Aŭdu tiun trian kanzonon de Julio Baghy.

(muziko)

Cl.- La kanzono, kiun vi ĵus aŭdis, estis verkita de Julio Baghy, ĝi titoliĝas : 'Polvohomo meditas'. Fakte, Julio Baghy verkis multajn muzikaĵojn por siaj poemoj. Sur la kasedo de Jozef Dinnyés, ĵus eldonita en Budapeŝto ni legas : 'La kantoj de tiu ĉi kasedo aperis ankaŭ libroforme kun muziknotoj, sub la sama titolo. Nepre aĉetu ankaŭ ĝin. Aĉetemuloj en la socialismaj landoj turnu sin al siaj landaj asocioj, en aliaj landoj al UEA.'

Estas ĉiam agrable povi akiri la tekstojn de la kanzonoj, kiujn proponas kasedoj. Pro tio ni estas ĝojaj, ke aperis la tekstoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014